

Veranstaltungshinweise

Unsere Esp.-Lernrunden für: a) Anfänger mit Vorkenntnissen (Stufe A2¹⁾): Do. 18:30-20:00 Uhr, Gemeindehaus der kath. Kirchengemeinde St. Willehad, St.-Willehad-Str. 37, 26954 Nordenham; b) Fortgeschrittene (Stufen B1, B2, C1¹⁾): Do. 19:45-21:15 Uhr, Ev.-luth. Kirchengemeinde Brake, Kirchenstr. 24, 26919 Brake. – **Spezieller Esperanto-Intensivkurs für Fortgeschrittene** (Nordenham, 13.-15. und 20.-22.11.2009; Details bei Hans Gerd, h_g_m@gmx.de, erfragen) – **Monatliche Vereinstreffen:** 15.10.2009, 19:30 Uhr, Gaststätte *Panorama*, An der Kaje 1B, 26931 Elsfleth; 21.11.2009, 19:30 Uhr, **Weihnachtsfeier**, Gaststätte *Weserterrassen*, Strandallee 10, 26954 Nordenham; 21.01.2010, 19:30 Uhr, Gaststätte *Friesenheim*, Friesenstr. 15, 26935 Rodenkirchen. Aktuelles u. Einzelheiten können unserer Netzseite <http://www.esperanto.de/unterweser/arangoj.htm> entnommen o. bei Alke Geveke, Tel.: 0177-1755475, erfragt werden. Gäste sind willkommen. Außerdem:

07.10.2009 Vorträge über Esp. im Rahmen d. Sprachen-Festivals, Bremen
http://www.hausderwissenschaft.de/Binaries/Binary3795/Flyer_Sept-Okt.pdf
 24.10.2009 EMAS²⁾-Kulturtago 2009 u. 6a Rata Rendevuo, Hameln
 30.10.-01.11.2009 Verbandsratssitzung d. Deutschen Esperanto-Bundes, ICH³⁾
 11.11.2009 Gruppenabend der Esperanto-Gruppe Bremen, Bremen:
 Alke berichtet über den 94. Esperanto-Weltkongress
 13.01.2010 Gruppenabend der Esperanto-Gruppe Bremen, Bremen:
 Andreas berichtet von seiner Dissertation über Esperanto
 02.-09.04.2010 26. Internationale Frühlingswoche (PSI), Sankt Andreasberg

¹Erläuterung d. Stufen: http://www.europass.cedefop.europa.eu/img/dynamic/c1349/type.FileContent.file/ELPEexamples_de_DE.pdf, S. 2; auf Esp.: <http://www.edukado.net/pagina/Legejo/149/#691>

²EMAS: Esperanto-Ligo de Malsupra Saksio (Landesverb. Niedersachsen im Dt. Esp.-Bund e. V.)

³ICH: Interkultura Centro Herzberg, Grubenhagenstr. 6, 37412 Herzberg, Tel.: 05521-5983

Gojan kristnasko-feston kaj bonan gliton en la novan jaron!
Ein frohes Weihnachtsfest und einen guten Rutsch ins neue Jahr!

Impressum:

Zeitschrift:

Erscheinungsweise:

Herausgeber:

Information und Redaktion:

Bankverbindung

(für Beiträge und Spenden):

Esperanto Gazeto (ISSN 1861-3330)
 dreimal jährlich als Druckausgabe und
 elektronische Ausgabe, Netzseite:
<http://www.esperanto.de/unterweser/gazeto.htm>
 Esperanto-Gruppe Unterweser e. V.
 (<http://www.esperanto.de/unterweser>)
 Anne Höpken, Magdalenenstr. 27,
 26954 Nordenham, Tel.: 04731-4837
 Dörte Bierkämper, Tel.: 04404-3368
 Dr. Andreas Kück, Tel.: 04702-5044
 Mario Müller, Tel.: 04732-1373

Raiffeisenbank Oldenburg eG
 BLZ 28060228
 Kontonummer 1200160000
 (Kassenwartin: Dörte Bierkämper)

E G U - Esperanto - Gruppe Unterweser e. V.

Esperanto Gazeto

N-ro 26

ISSN 1861-3330

Okt. 2009 – Jan. 2010

EGU-Info: <http://www.esperanto.de/unterweser>



Rodenkirchen, 26.09.2009: Kein Sitzstreik, sondern unser Werben für Esperanto am Rande des Festumzugs des Rodenkircher Marktes.

Rodenkirchen, 26-a de Septembro 2009: Neniu sidstriko, sed nia reklamado por Esperanto ĉerande de la festprocesio de la foiro de Rodenkirchen.

Junia ekskurso de la Esperanto-grupo de Bremeno (Bassum, 27-a de Junio 2009)

Dek tri esperantistoj de la grupoj de Bremeno kaj Unterweser renkontiĝis en Bassum. Sinjorino Bode gvidis ilin tra la tiea kanonikinejo kaj apuda kanonikeja preĝejo, briĝstona konstruaĵo en gotika stilo el la 13-a jarcento. La ekskursanoj eksciis multon pri la historio kaj arthistorie gravaj trezoroj de tiuj konstruaĵoj kaj admiris la familiajn blazonojn de la kanonikinoj kaj abatinoj (la nuna ekoficis nur antaŭ nelonge). La kanonikinejo estas la plej malnova en Malsupra Saksujo kaj estis fondita en 858 de la nobelino Luitgart. Por tio ŝi donis sian patran heredaĵon. De tiam la kanonikinejo, kiu estas la ĝermĉelo de Bassum, ebligas al nobelaj filinoj specialan kristanan edukon. En la ĉefa salono troviĝas



Im Frauenstift von Bassum / En la kanonikinejo de Bassum

granda tablo, kiu pro kialoj de stabileco de la konstruaĵo ne devas esti forigata. La ekskurso finiĝis per komuna kafotrinkado en la kafejo Burgcafé. – Andreas

Juni-Ausflug der Esperanto-Gruppe Bremen (Bassum, 27.06.2009)

Dreizehn Esperantisten der Gruppen Bremen und Unterweser trafen sich in Bassum. Frau Bode führte sie durch das dortige Frauenstift und die benachbarte Stiftskirche, einem Backsteingebäude in gotischem Stil aus dem 13. Jahrhundert. Die Ausflügler erfuhren viel über die Geschichte und kunsthistorisch wichtigen Schätze der Bauwerke und bewunderten die Familienwappen der Stiftsdamen und Äbtissinnen (die jetzige trat erst vor kurzem ihr Amt an). Das Frauenstift ist das älteste in Niedersachsen und wurde 858 von der Edeldame Luitgart gegründet. Dafür gab sie ihr väterliches Erbe. Seitdem ermöglicht das Frauenstift, das die Keimzelle von Bassum ist, adeligen Töchtern eine besondere christliche Erziehung. Im



In der Stiftskirche von Bassum / En la kanonikeja preĝejo de Bassum

Hauptsalon befindet sich ein großer Tisch, der aus Gründen der Stabilität des Bauwerks nicht entfernt werden darf. Der Ausflug endete mit einem gemeinsamen Kaffeetrinken im Burgcafé. – Andreas

Enigma

	1	2	3	4	5	6
1						
2				9		
3						
4					7	
5					10	
6		8				

Ĝuste ordigite, la literoj en la grizaj ĉeloj rezultigas la nomon de regno en Kariba Maro.

Horizontale

1: vasta grupo da homoj; **2:** ne-profesiulo [sen finaĵo]; **3:** konsekrita al dieco; **4:** trupo [sen finaĵo]; **5:** grandega konstruaĵo por homloĝado; **6:** finaĵo de infinitivo; **7:** aŭtosigno de Tajlando; **8:** tio, kio impresas la flarsensojn [sen finaĵo]

Vertikale

1: iradi de unu loko al alia, ne restante ie; **2:** ŝtato en la sudokcidenta Azio; **3:** ŝtato en Centr-Ameriko; **4:** afikso de pasiva participo estontaĵa; **5:** ŝtata pola flugkompanio (mallongigo); **6:** homo, kiu kutimas fari publikajn paroladojn [sen finaĵo]; **9:** rigardi ion kiel veran sen postulado de pruvo [sen finaĵo]; **10:** japana tabulludo [sen finaĵo]



Białystok: Blick von der Zamenhof-Straße auf den Marktplatz / Bjalistoko: vido de la Zamenhof-strato al la bazarplaco

Herbstbild

Dies ist ein Herbsttag, wie ich keinen sah! Jen autuntago, kian ne vidis mi!
Die Luft ist still, als atmete man kaum, Kvazau oni apenau spirus, la aer' trankvilas,
Und dennoch fallen raschelnd, fern und nah, Kaj tamen, for kaj malfor de tie chi,
Die schönsten Früchte ab von jedem Baum. De chiu arb' kun susur' la plej belaj fruktoj falas.

O stört sie nicht, die Feier der Natur! Ho, ne gheni ghin, la feston de l' natur!
Dies ist die Lese, die sie selber hält; Jen la rikolto, kiun mem faras ghi;
Denn heute löst sich von den Zweigen nur, Char hodiau disighas de l' branĉoj nur,
Was von dem milden Strahl der Sonne fällt. Kio falas pro la milda sunrad'

Friedrich Hebbel (1813-1863)

(el la germana esperantigis Andreas)

Autumbild'

Nia somerfesto (Nordenham, 18-a de Julio 2009)

Semajnon antaŭ la Universala Kongreso de Esperanto dek du membroj de nia klubo kaj unu membro de la Esperanto-grupo de Bremeno renkontiĝis por kradrostado, manĝado kaj ludado ĉe Hans Gerd okaze de nia somerfesto. Ĝin organizis nia festkomitato. La vetero ne estis perfekta: Ventpuŝoj ĉiam denove klopodis blovrenversi la stangojn, kiuj iomete improvize subtenis foliegon. Ĝi al kelkaj, kiuj ne sidis sub la terasa tegmento, servis kiel ŝirmilo kontraŭ la tuttempe minacanta, sed finfine feliĉe nur malmultajn minutojn daŭrinta pluveto. Por la korpa bonfarto estis bongustaj viando, kolbasoj kaj eĉ surstangetaj vegetaraĵoj de l' kradrostilo kaj krome salatoj. – Andreas



*Dum nia somerfesto 2009 /
Bei unserem Sommerfest 2009*

Unser Sommerfest (Nordenham, 18.07.2009)

Eine Woche vor dem Esperanto-Weltkongress trafen sich zwölf Mitglieder unseres Vereins und ein Mitglied der Bremer Esperanto-Gruppe bei Hans Gerd zum Grillen, Essen und Spielen anlässlich unseres Sommerfestes. Das organisierte unser Festausschuss. Das Wetter war nicht perfekt: Windböen versuchten immer wieder, die Stangen umzuwehen, die ein wenig improvisiert eine Plane stützten. Sie diente einigen, die nicht unter dem Terrassendach saßen, als Schirm gegen den die ganze Zeit drohenden, aber zum Glück nur wenige Minuten dauernden leichten Regen. Für das leibliche Wohl gab es leckeres Fleisch, Würste und sogar vegetarische Spieße vom Grill sowie Salate. – Andreas



*Tio ne estas la manĝeja tendo dum la
Universala Kongreso de Esperanto en
Bjalistoko /*

*Das ist nicht das Speisezelt beim Esperanto-
Weltkongress in Bjalystok*

sogar vegetarische Spieße vom Grill sowie Salate. – Andreas

94-a Universala Kongreso de Esperanto (Bjalistoko, Pollando, 25-a de Julio ĝis 1-a de Aŭgusto 2009)

El la proksimume 1860 partoprenantoj el ĉirkaŭ 60 landoj estis ankaŭ kvar membroj de nia klubo: Alke, Andreas, Hans Gerd kaj Mario. Bjalistoko estas la ĉefurbo de Podlaĥia Provinco en la orienta Pollando, havas 300.000 loĝantojn kaj efektas moderne kaj verde – ĉi lastan kaj pro siaj parkoj kaj sia ligiteco al Esperanto: Antaŭ 150 jaroj, en la 15-a de Decembro 1859, en Bjalistoko naskiĝis L. L. Zamenhof, iniciatinto de Esperanto. Al tio ĉi rilatas la kongresa temo “Krei pacan ponton inter la popoloj”: Zamenhof hodiaŭ”. La ĉefa kongresejo estis la Bjalistoka Politekniko. Sur la apuda vasta herbtapiŝo estis starigitaj tendoj: unu tre granda por proksimume 2000 homoj kaj plia, kiel manĝejo aldone al la kafejo en unu el la Politeknikaj konstruaĵoj, en kiuj krome estis dolĉaĵ- kaj trinkaĵ-aŭtomatoj. La provizo de la kongresanoj per manĝaĵoj, trinkaĵoj kaj eblaĵoj, dum tio komfortete sidi kune en la freŝa aero, estis tre bona kaj lige kun la ekde la lundo reganta bela vetero certe kontribuis al la agrabla etoso. La kongresprogramo estis multfaceta; ekzemploj: Kurso pri teleskopoj de Galileo ĝis la spacteleskopo memorigis pri tio, ke 2009 estas la internacia jaro de astronomio. Nokte la kursanoj per teleskopo observis la lunojn de Jupitero kaj aliajn interesajn astrojn. En la Kleriga Lundo estis prezentitaj interalie distra matematiko kaj sorobano (japana abako). Per la teatraĵo “Babelturo” estis ilustrite, kiel la juna Zamenhof en la Bjalistoka bazarplaco, kie aŭdiĝis kvereloj en multaj lingvoj, estis instigita iniciati Esperanton. Pli pri la vivo de Zamenhof oni povis ekscii ankaŭ en ekspozicio en la nov-inaŭgurita Zamenhof-Centro de Bjalistoko. Bonega etoso regis dum la publika koncerto de JoMo en urba parko. Kiu satiĝis je la urbo, povis ĝui la ĉirkaŭantan naturon en ekskurso, ekzemple laŭ la rivero Bug. Tamen niaj partoprenantaj klubanoj ne nur lasis sin amuzi, sed ankaŭ aktive kontribuis al la kongreso: En la movada foiro Hans Gerd klarigis la virtualan mondon “Dua Vivo”, en kiu estas ankaŭ ia Esperanto-lando, kiel en la reala, unua mondo. Kaj kadre de la aranĝo “Klasika Esperanto” Andreas faris prelegon pri Regulo 15, do pri vortoj fremdaj en Esperanto. Kiu tion ĉi maltrafis, ne nepre bezonas ĉagreniĝi: En la EMAS-Kulturtago (24a de Oktobro 2009) Andreas denove prelegos prie. – Andreas



*Hans Gerd (centre) kun du aliaj kongresanoj
inter unu el la Politeknikaj konstruaĵoj kaj la
herbtapiŝo, sur kiu staras la manĝeja tendo /
Hans Gerd (M.) mit zwei anderen
Kongressteilnehmern zwischen einem der
Polytechnikumsgebäude und dem Rasen, auf
dem das Speisezelt steht*

– Andreas

94. Esperanto-Weltkongress (Bialystok, Polen, 25.07.-01.08.2009)

Unter den ungefähr 1860 Teilnehmern aus etwa 60 Ländern waren auch vier Mitglieder unseres Vereins: Alke, Andreas, Hans Gerd und Mario. Bialystok ist die Hauptstadt der Provinz Podlachien im östlichen Polen, hat 300.000 Einwohner und wirkt modern und grün – Letzteres sowohl wegen seiner Parks als auch seiner Verbundenheit zu Esperanto: Vor 150 Jahren, am 15. Dezember 1859, wurde in Bialystok L. L. Zamenhof geboren, der Initiator des Esperanto. Darauf bezieht sich das Kongressthema „Eine friedliche Brücke zwischen den Völkern errichten: Zamenhof heute“. Das Hauptkongressgebäude war das Bialystoker Polytechnikum. Auf dem angrenzenden weitläufigen Rasen waren Zelte aufgestellt: ein sehr großes für etwa 2000 Leute und ein weiteres als Speisezelt ergänzend zu dem Café in einem der Polytechnikumsgebäude, in denen es außerdem Süßigkeiten- und



2009: La internacia jaro de astronomio /
2009: Das internationale Jahr der Astronomie

Getränkeautomaten gab. Die Versorgung der Kongressteilnehmer mit Essen, Trinken und Möglichkeiten, dabei gemütlich an der frischen Luft zusammensitzen, war sehr gut und trug in Verbindung mit dem vom Montag an herrschenden schönen Wetter gewiss zu der angenehmen Atmosphäre bei. Das Kongressprogramm war vielseitig; Beispiele: Ein Kurs über Fernrohre von Galileo bis zum Weltraumteleskop erinnerte daran, dass 2009 das internationale Jahr der Astronomie ist. Nachts beobachteten die Kursteilnehmer mit dem Fernrohr die Jupitermonde und andere interessante Gestirne. Am Bildungsmontag wurden unter anderem unterhaltsame Mathematik und Soroban (japanischer Abakus) dargeboten. Mit dem Theaterstück „Babelturo“ (Babelturm) wurde veranschaulicht, wie der junge Zamenhof auf dem Bialystoker Marktplatz, wo Streitigkeiten in vielen Sprachen zu hören waren, dazu angeregt wurde, Esperanto ins Leben zu rufen. Mehr über Zamenhofs Leben konnte man auch in einer Ausstellung in dem neu eingeweihten Zamenhof-Zentrum von Bialystok erfahren. Eine tolle Stimmung

herrschte beim öffentlichen Konzert von JoMo in einem städtischen Park. Wer von der Stadt genug hatte, konnte die umgebende Natur in einem Ausflug genießen, z. B. entlang dem Fluss Bug. Allerdings ließen sich unsere teilnehmenden Vereinsmitglieder nicht nur amüsieren, sondern sie trugen auch aktiv zum Kongress bei: In der Ausstellung zur Esperanto-Bewegung erklärte Hans Gerd die virtuelle Welt „Zweites Leben“, in der es auch eine Art Esperanto-Land gibt, wie in der wirklichen, ersten Welt. Und im Rahmen der Veranstaltung „Klasika Esperanto“ hielt Andreas einen Vortrag über die Esperanto-Regel 15, also über Fremdwörter im Esperanto. Wer das verpasste, braucht sich nicht unbedingt zu ärgern: Beim EMAS-Kulturtag (24.10.2009) trägt Andreas erneut dazu vor. – Andreas

Transdono de pliaj Esperanto-libroj kaj -viddiskoj al la urbobiblioteko de Nordenham

(Nordenham, 12-a de Septembro 2009)

Jochen Dudeck, estro de la urbobiblioteko de Nordenham, povas ĝoji pri speciala donaco: Anne, prezidantino de nia Esperanto-klubo, transdonis pliajn novajn Esperanto-librojn kaj -viddiskojn. La urbobiblioteko de Nordenham per tio ĉi disponas je rimarkebla stoko da Esperanto-lernolibroj kaj -romanoj, kiuj povas esti prunteprenataj ĉiutempe. Thomas (de Esperanto-Ligo de Malsupra Saksujo) prie diris: „La urbobiblioteko de Nordenham per tio ĉi estas modeldona en Malsupra Saksujo.“ – Anne



De maldekstre al dekstre: / Von links nach rechts: Jochen Dudeck, Anne, Thomas

Übergabe von weiteren Esperanto-Büchern und -DVD an die Stadtbücherei Nordenham

(Nordenham, 12.09.2009)

Jochen Dudeck, Leiter der Stadtbücherei Nordenham, kann sich über ein besonderes Geschenk freuen: Anne, die Vorsitzende unseres Esperanto-Vereins, übergab weitere neue Esperanto-Bücher und -DVD. Die Stadtbücherei Nordenham verfügt damit über einen ansehnlichen Bestand an Esperanto-Lehrbüchern und -Romanen, die jederzeit ausgeliehen werden können. Thomas (vom Esperanto-Landesverband Niedersachsen) sagte dazu: „Die Stadtbücherei Nordenham ist damit in Niedersachsen beispielgebend.“ – Anne